# HORIZONTO

V-a JARO N-o 29 (5)
SEPTEMBRO - OKTOBRO 1980

KULTURA KAJ INFORMA REVUO



Antaŭ la Konferencejo

## KURAĜIGA KONFERENCO

## PRINCIPOJ DE BATALO

## ARMAND SU LIBERIGITA

## DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

# HORIZONTO

Direktorino
Inés Gastón

Redakta Komitato
Salvador Gumá
Juan Régulo
Jean Thierry

Red. kaj Adm.
Inés Gastón
P.° de la Constitución, 35
Telf. (976) 22.05.21
Zaragoza-1 (Hispanujo)

Eldonkvanto 1.000 ekzempleroj
Dumonata revuo
Presita en Zaragoza
ĉe "Tipografía C. Boloix"
str. Reina Fabiola, 7, Zaragoza-8

Leĝa Depono Z - 133 - 76

**N.° 5 — Septembro - Oktobro 1980**


ENHAVO


KURAĜIGA KONFERENCO
(Jean Thierry)

REZOLUCIOJ

POSTKONFERENCAJ VORTOJ
(Marianne Muller)

LA IDEA SIGNIFO KAJ SOLIDARIGA FUNKCIO DE LA INTERNACIA LINGVO
(el la Inaŭgura Parolado de Prof. Lapenna)

PRINCIPOJ DE BATALO
(Sokrato Sakellaropoulos)

BELETRO
Armand Su Liberigita (Edwin de Kock)
La Fremdulo
(trad. Juan Azcuénaga Vierna)

ADIAŬO EL LA DIREKCIO KAJ ADMINISTRACIO DE HORIZONTO
(Inés Gastón)

AKTO PRI LA FONDO DE LA INTERNACIA CENTRO DE N.E.M.

LA PRINCIPO DE NEŬTRALECO EN LA ESPERANTO-MOVADO
(Jean Thierry)

LIBROJ SUB LA LUPEO
(Recenzas, Salvador Gumá)

7-a INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO
Oficiala Informilo N-ro 1

JUBILEA DATREVENO
(Stefano Csombai)

20-aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ — 1980-a

INTERNACIA CENTRO DE N.E.M.
Informa bulteno n-ro 1


## KIEL ABONI

Abonojn al «Horizonto» akceptas la administracio: Inés Gastón, Paseo de la Constitución, 35, Zaragoza-1, Hispanujo. Pĝk. Zaragoza 00428398. (Jarabono por Hispanujo kaj Portugalujo 600 ptoj., por eksterlando 700 ptoj. aŭ 12 usonaj dolaroj), aŭ la sekvantaj.

## PERANTOJ

Aŭstrujo:
Dro. Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 GRAZ. Pĉk. Graz 1257.845. Jarabono: 160,— S.

Britujo:
Geoffrey King, 14 Elmdale Road, LONDON N13 4UL. Pĉk. 37.507.9106. Jarabono: 7 £.

Danlando:
Peter Zacho, Nørregardsvej 91, DK-2610 RØDOVRE, Pĝk. 6287859. Jarabono: 70,— D Kr.

Finlando:
Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101 KUOPIO 10, Pĝk. KU 152801-5. Jarabono: 50,— F. Mk.

Francujo:
André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle. F-75018 PARIS. Pĉk. Paris 21.670.96 V. Jarabono: 50,— Fr.

FR Germanujo:
Rudolf Helmke, Wiesenstrasse 9, D-4773 MÖHNESEE-GÜNNE. Konto-Nr. 31 377 450 Sparkasse Möhnesee (BLZ 414 514 85). Jarabono: 24,— DM.

Grekujo:
Adda Sakelaropoulou, Sokratous 88 Omonia, ATHENO 101. Jarabono: 380,— Grekaj Drakmoj.

Israelo:
Ben-Alter Jehiel, P. O. B. 379, PETAH TIKVA. Pĉk. Bank Hadoar, 4-45854-8. Jarabono:

Jugoslavio:
D-ro Oton Pancer, Voćarsko Naselje 10, YU-41000 ZAGREB. Jarabono: 216 n. din.

Kanado:
Kriss Smilga, 34 Martin Road. TORONTO Ont. M4S 2V2. Jarabono: 14,— $.

X Luksemburgo:
Wickler Albert, OLM. Pĝk. 54175-49. Jarabono: 380 lfr.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al unu el tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu lando estos trovita. Personoj pretaj funkcii kiel perantoj, bv. sin turni al la direktorino.


**PLEJ GRAVAJ VERKOJ**

Eldonejo: PLAZA & JANES, S. A.
ESPLUGAS DE LLOBREGAT
(Barcelona - Hispanujo)

# KURAĜIGA KONFERENCO

La VI-a INTERNACIA KONFERENCO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO estis grava, instiga kaj fruktodona.

Grava ĝi estis jam dekomence pro la cirkonstancoj. Post la UEA-statutaj ŝanĝoj, kies konsekvencoj ankaŭ formale akrigas la falon de la partipolitika neŭtraleco, stariĝis du demandoj antaŭ la partoprenantoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado: ĉu daŭrigi la NEM-konferencojn? ĉu plu levi la voĉon de la revuo HORIZONTO? Unuvorte ĉu pli aŭdigi voĉon de Kasandra al homoj, kiuj ŝajne ne volas esti informitaj kaj rifuzas malfermi la okulojn kontraŭ la realaĵo?

Grava ĝi do ne povis ne esti, kaj ĝi estis ankaŭ pro sia studtemo kaj siaj aranĝoj. Starigi en Strasburgo mem la demandon pri *«la lingvodiverseco kiel obstaklo al kreo de Eŭropa konscio»* kaj ekzameni el tia vidpunkto la tradukajn problemojn kaj la proponon de tempo-plano por enkonduko de neŭtrala solvo, jen kio troviĝis en la taŭga loko!

La aranĝoj estis indaj je la cirkonstancoj. La solena inaŭguro okazis digne meze de floroj kaj muziko en la ĉeesto de d-ro Leissner, vicurbestro, reprezentanta s-ron Pfimlin, la urbestron de Strasburgo. D-ro Leissner montris vivan interesiĝon pri la Lingvo kaj la libroj publikigitaj en ĝi; li atente aŭskultis per traduko la tutan inaŭguran paroladon, per kiu prof. d-ro Ivo Lapenna elmontris, kiel ĉiu lingvo estigas inter siaj parolantoj fortegan senton de solidareco kaj samtempe kontraŭ la neparolantoj ian barilon de fremdeco: tial gravega por la Eŭropa Unio estiĝas la bezono de komuna lingvo.

Du ekskursoj kaj du vesperaj prezentoj ilustris la kulturajn valorojn de Strasburgo kaj Alzaco. Estis agrabla vizito de la urbo tra la piedira kvartalo, la plej malnova kaj riĉa je historiaj enhavoj; kaj tuttaga promenado tra la Altaj Vogezoj kun tagmanĝo apud intermonto, vespermanĝeto en ebenaĵa vilaĝo, kaj posttageza halto en vilaĝo fame konata pro siaj historiaj domoj kaj la vino de sia regiono.

Kultura vespero konsistis el klasika muziko, alzacaj kantoj kaj folkloraj dancoj; alia el prezento «SONO kaj LUMO» en la katedralo: la kruciĝo de la vojoj de Eŭropo, la arĥitektureco de la preĝejo, la ĉefaj eventoj en la urbo, kaj la pinta turo kuniganta la ĉiutagon kun la eterno. Lasta ĵaŭda vespero kunigis ĉiujn per agrabla bankedo en restoracio de la Rejnparko. Kompreneble vizito al la Palaco de Eŭropo kun kompetenta gvidado kaj klarigoj en Esperanto memorigis almenaŭ principe al la Eŭropaj Instituciuj la pluan ekzistadon de la Lingvo Internacia.

Plej instigaj estis interalie jenaj faktoj: la nombro de la aliĝintoj kaj aparte de la gejunuloj, kaj la memvola scivolemo de ĵurnalistoj.

Ĉeestis multaj partoprenantoj el dek kvar nacioj; kaj la mezaĝo de la ĉeestantaro rejuniĝis. Dume multiĝis la gejunuloj tiagrade, ke estos antaŭviditaj ekde nun specialaj aranĝoj por ili.

Unu ĵurnalisto estis invitita, tiu de *«Dernières Nouvelles d'Alsace»*; sed post lia brila artikolo alvenis memvole pluraj aliaj, unu de «Libération», alia de la Radio — kaj Televido-stacio, kaj ankaŭ aliaj de germana kaj itala gazetoj. La radio-elsendo konsistis el intervjuo de pli ol dek minutoj surbaze de inteligentaj demandoj.

El la artikolo de «Dernières Nouvelles d'Alsace» citindaj estas jenaj elementoj — unue la titolo: «UNU LINGVO, CIMENTO DE LA EŬROPA KONSTRUADO». Sed ankaŭ:

> ... «Paroli pri internacia lingvo en epoko, kiam temas nur pri regionismo, partikularismo kaj respekto al lingvoj kaj dialektoj lokaj, povas ŝajni esti ia anakronismo. Necesas do tuj formeti ambiguecon: Esperanto neniam pretendis anstataŭi la diversajn lingvojn; ja male! La multeco de ĉ. 3.000 lingvoj kaj dialektoj tra la mondo estas kultura fakto, kiun respektas la esperantistoj. Kaj kiun ili protektas: ektuŝante la problemon de la internacia komunikado, ili defendas ĉiujn lingvojn kontraŭ la lingva imperiismo de iuj nacioj.
>
> Laŭ Jerzy Korytkotkowsky, kiu tenas la katedron de Esperanto en la Universitato de Lublin (Pollando), «ĉiu lingvo portas en si propran tradicion, propran senton, same kiel iun afekcian ligon kun la parolanto. Ĉi tiu afekcio estas tiel forta, ke ĝi ĉiam kontraŭstaros al la altrudiĝo de alia nacia lingvo kiel rimedo de internacia komunikado. El tio necesiĝas neŭtrala lingvo, kiu ne provos forigi la kulturan trezoron de iu nacio sed kies esenca rolo estos efike servi al la tuta homaro».
>
> Laŭ profesoro Lapenna, la elekto de iuj oficialaj lingvoj por la laboroj de la ĉefaj internaciaj organizaĵoj estas kultura diskriminacio kontraŭ la fundamentaj principoj de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj.

En la internaciaj instancoj kaj kunvenoj la tradukado starigas egajn problemojn: tempoperdon, cenzur-eblecon, konsiderindan elspezadon. En UNO la tradukkostoj transpasas la tuton de la helpo donita al la evoluiĝantaj landoj; triono de la dungitoj de la Eŭropa Komisiono estas tradukkostoj.» ...

Unuvorte unu el la plej bonaj artikoloj aperintaj en franca gazeto!

Fruktodona estis la VI-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, kiel konstateble estas per jenaj kvar rezolucioj.

La I-a koncernas la lingvodiversecon en Eŭropo.

REZOLUCIO — I

La 6-a INTERNACIA KONFERENCO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO, kunveninta en Strasburgo de la 26-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1980,

— KONSIDERINTE la lingvo-diversecon en Eŭropo kiel obstaklon al kreo de Eŭropa konscio, se ne per si mem, almenaŭ je manko de komuna lingvo,

— KONSTATAS, ke male al la opinio, ke nur *«la volo vivi kune»* estigas naciŝtatan konscion, komuna lingvo estas esenca faktoro en la formiĝo de grupapartena konscio interalie pro la fortega sento de solidareco, kiun ĝi naskas kaj nutras inter ĉiuj, kiuj parolas ĝin;

— MEMORIGAS, ke por Eŭropo la Internacia Lingvo Esperanto prezentas gravajn kvalitojn por fariĝi unuapaŝe la komuna lingvo de Eŭropo, garantiante samtempe la pluan vivon kaj disvolviĝon de la etnaj lingvoj.

La 2-a atentigas la EŬROPA-n KLUBO-n pri du danĝeraj vojoj.

REZOLUCIO — II

La 6-a INTERNACIA KONFERENCO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO, kunveninta en Strasburgo de la 26-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1980,

— KONSIDERINTE, kiel akuta fariĝis la lingvoproblemo en la nuntempa Eŭropo precipe karakterizita de granda lingvodiverseco,

— SIMPATIE RILATAS al la klopodoj de la Eŭropa Klubo, kondiĉe ke:

1.° ĉiuj oficialaj dokumentoj de la Eŭropa Klubo ne enhavu la frazon: *«ĝis kiam eventuale alia neŭtrala lingvo fariĝos oficiala internacia scienca interkompreniĝilo per deklaro far Unesko»*;

2.° oni ne egaligu la vivantan internacian lingvon ESPERANTO kun iu ajn projekto de t.n. *«interlingvoj»* aŭ *«planlingvoj»*.

La 3-a rilatas al la plua ekzistado de la revuo HORIZONTO kaj al la 7-a venonta Internacia Konferenco.

REZOLUCIO — III

La 6-a INTERNACIA KONFERENCO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO, kunveninta en Strasburgo de la 26-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1980,

— KONSIDERINTE, ke pro personaj kaj familiaj kaŭzoj la redaktorino kaj administrantino de HORIZONTO Inés Gastón deklaris, ke ŝi deziras fini sian laboron ĉe la fino de la jaro,

— ESPRIMAS al ŝi tre koran dankon pro la ampleksa laboro entreprenita kaj farita en la lanĉado kaj administrado de HORIZONTO dum kvin jaroj;

— ELEKTAS s-rojn H. V. Rasmussen kaj J. Thierry kiel redaktorojn, esprimante samtempe la esperon, ke Prof. J. Régulo Pérez kaj s-ro S. Guma plu restos membroj de la Redakta Komitato;

— DECIDAS, ke la revuo HORIZONTO ekde la komenco de la jaro 1981 aperu en Kopenhago (Danlando):

— DECIDAS, ke la 7-a INTERNACIA KONFERENCO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO okazos en Danlando, kaj KOMISIAS la danan agad-grupon prizorgi la organizon.

La 4-a, fine, fondas INTERNACIA-n CENTRO-n de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO kaj deklaras, ke la HISPANA ESPERANTO-MUZEO de s-ro HERNANDEZ estos de nun la ESPLORA KAJ DOKUMENTA INSTITUCIO de la Centro.

REZOLUCIO — IV

La 6-a INTERNACIA KONFERENCO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO, kunveninta en Strasburgo de la 26-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1980,

— KONSIDERINTE, ke per la akcepto de la nova statuto UEA ankaŭ formale forlasis la principon de neŭtraleco, kiel formulitan en la antaŭa statuto de la asocio kaj praktikatan ĝis la eventoj de Hamburgo 1974,

— KONSTATAS, ke en tiaj kondiĉoj la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO devas pli ol iam ajn antaŭe esprimiĝi en la intereso de Esperanto kaj de la Esperanto-Movado;
— DECIDAS fondi INTERNACIAN CENTRON de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO kun statuto aprobita de la Konferenco;

— KUN DANKO AKCEPTAS la proponon de s-ro HERNANDEZ, ke la HISPANA ESPERANTO-MUZEO fariĝu la ESPLORA KAJ DOKUMENTA INSTITUCIO DE LA CENTRO.

Konklude ĉio ĉi estis ebla nur dank'al la sindona laboro de s-ino M. Muller helpe de kelkaj strasburganinoj kaj f-ino M. Vermaas: la aranĝojn de la tuta konferenco organizis loka grupeto, al kiu iras denove nia kora dankesprimo.

*Jean THIERRY*

# POSTKONFERENCAJ VORTOJ

La VI-a Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado estas finita.

Laŭ mia opinio kaj eble tiu de multaj gekonferencanoj — ĉu mi povas esperi, tiu de ĉiuj? — tiu Konferenco havis sukceson. Sed, mi lasas al aliaj la zorgon priraporti.

Hodiaŭ mi nur volas skribi la jenajn vortojn:

La sukceson ni ŝuldas kompreneble unue al la elstaraj prelegoj, inter aliaj tiuj de Prof. Dro Lapenna.

Sed ni ŝuldas ĝin ankaŭ al la diversaj helpintoj, kaj unue mi menciu F-inon Vermaas kiu venis al mi kelkajn tagojn jam en decembro, kaj unu semajnon antaŭ la Konferenco por elprepari la dokumentujojn kaj multajn aliajn informaĵojn, laboro kiun oni povis fari nur en la lastaj tagoj.

Poste mi menciu

— F-ino Haeusser, kiu prizorgis la libroservon kvankam ŝi ĵus revenis, sufiĉe laca, el kuracloko,

— S-ino Spraŭel, kiu okupiĝis en la Informejo pri disdono de la dokumentujoj kaj vendis preskaŭ 200 bildkartojn kaj la bezonatajn poŝtmarkojn,

— S-ro Wick, poŝtisto, kasisto de la Esperanto-grupo de Strasburgo, kiu bonvolis esti ankaŭ nia kasisto. — Sidis apud li,

— S-ino Dratwer, kiu donis la ŝlosilojn de la ĉambroj al la alvenantoj kiuj ordigis sian konton ĉe la kasisto.

— S-ino L. Thune, kiu oferis sian tempon por la registrado de ĉiuj manifestacioj sur magnetofono.

Fine en la angla oni dirus «last not least»,

— Pierre Zacho, kiu majstre estris la bufedon, ĉar la alzaca suno brulegis kaj la Konferencanoj, por ne morti de soifo, bezonis pli ol 230 botelojn da biero, fruktosuko kaj mineralakvo. Por savi la honoron de la esperantistoj mi devas akcenti ke plej multe konsumitaj estis la akvo-kaj fruktosukoj-boteloj, preskaŭ 200!

Al ili ĉiuj mi volas ĉi-tie sincere danki. Ili «deĵoris» senlace kaj ĉiam servoprete. Ankoraŭfoje grandegan kaj koregan dankon al ĉiuj helpintoj.

*Marianne Muller*

# LA IDEA SIGNIFO KAJ SOLIDARIGA FUNKCIO DE LA INTERNACIA LINGVO

(Partoj el la Inaŭgura Parolado de Prof. Lapenna)



## I

Antaŭ ĉio mi esprimas en la nomo de la Konferenco tutkoran dankon al la Urbestraro de Strasburgo pro ĝia interesiĝo pri niaj laboroj kaj al vi, Sinjoro Vicurbestro persone, pro via ĉeesto dum tiu ĉi inaŭgura kunsido.

Plej profundan kaj tute specialan dankon ni ĉiuj ŝuldas al S-ino Marianne Muller. Preskaŭ tute sola — kun aparta helpo de F-ino Marianne Vermaas, antaŭe direktorino de la Centra Oficejo de UEA — ŝi prizorgis ne nur la havigon de vere taŭga konferencejo, sed ankaŭ ĉiujn multnombrajn teknikajn detalojn kaj elstaran kulturan programon. La senfine sindona tutjara laboro de S-ino Muller atingis kulminon per tiu ĉi brila inaŭgura kunsido kaj, mi fidas, tutcerte estos plene kronita per la sukceso de la 6-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado.

Ni kunvenas en tiu ĉi historia urbo, kiu en la pasinteco estis ofte kaŭzo de rivalecoj, objekto de antagonismoj inter du grandaj nacioj kaj eĉ scenejo de bataloj, sed nun prezentiĝas kiel unu el la ĉefurboj de la naskiĝanta unueca Eŭropo. Ni renkontiĝas el la tuja proksimeco de la Rejno, kiu dum jarcentoj estis riverego de disigo, sed nun estas faktoro de kunligo. Ni troviĝas en loko kie funkcias la Eŭropa Kortumo pri Homaj Rajtoj, la sola tiaspeca internacia kortumo, antaŭ kiu unuopulo povas rekte plendi pro malobservo de siaj homaj rajtoj, se li apartenas al unu el la ŝtatoj, kiuj ratifikis la Eŭropan Konvencion pri la Homaj Rajtoj.

Malfacile troveblas loko, kies spirita klimato pli taŭgus por konferenco de la neŭtrala Esperanto-movado, kiu perfekte komprenas, ke la observo de la homaj rajtoj estas esenca kondiĉo por efika laboro favore al la Internacia Lingvo, kaj ke, aliflanke, la libera utiligo de tiu lingvo donas plenan sencon al la homaj rajtoj, precipe al la rajtoj je libereco de penso, opinio, kunvenado, moviĝo kaj komunikado trans landlimoj.

Se ni estas dankaj al Strasburgo pro la atmosfero, kiun ni ĝuas ĉi tie kaj certe povas multon lerni, ankaŭ la strasburgaj institucioj povas sufiĉe lerni de nia Konferenco, de la ideoj kaj idealoj, kiujn ĝi reprezentas. La Eŭropa Konsilantaro — same kiel la aliaj eŭropaj institucioj kaj organizaĵoj — celas al pli granda eŭropa unueco en diverseco, al kreado de eŭropaj konscio kaj konscienco, sed ili frontas la lingvodiversecon kiel unu el la ĉefaj obstakloj malebligantaj la atingon de tiu celo. Ni diskutos tiun demandon en la kadro de la unua ĉeftemo kaj esperas, ke la rezultoj almenaŭ iom kontribuos al pli bona kompreno de la afero kaj tial ankaŭ al ĝia solvo.

La dua ĉeftemo — La Stato de la Esperanto-Movado en 1980 kaj la Rolo de la Neŭtrala Esperanto-Movado — estas ligita al la unua. En la nuna stadio de disvastigiteco de Esperanto nur vaste neŭtrala Esperanto-Movado, almenaŭ iel organizita, sendependa, t. e. senigita de fremdaj ideologiaj kaj partipolitikaj influoj, unuflanke, kaj firme konscia pri la elstare altaj pure lingvaj kvalitoj de Esperanto kaj pri ĝia solidariga rolo en la socio, aliflanke, povas sukcese science pledadi kaj fruktodone agadi por la vastigo de ĝia rolo kiel instrumento de internacia lingva komunikado kaj kiel esenca faktoro de laŭgrada integriĝado kun samtempa konservo de la naciaj kaj etnaj kulturaj apartaĵoj kaj iliaj ĉefaj trezoroj: la naciaj kaj etnaj lingvoj.

## II

En la fono de ambaŭ ĉeftemoj troviĝas la demando, ĉu lingvo — kiu ajn lingvo, do ankaŭ la Internacia — estas nur simpla teknika rimedo de komunikado, ega-

la laŭ sia socia valoro al telefono, telegrafo k. s. mekanikaj komunikiloj, sen kia ajn idea signifo, aŭ lingvo estas tute unike socia fenomeno ne sole servanta kiel instrumento de pensado kaj komunikado, sed ankaŭ efikanta solidarige, kuntene en rilato al la socia grupo, al kiu ĝi apartenas.

Ni ne prezentos ĉi tie la cirkonstancojn, kiuj inspiris D-ron Zamenhof pene labori ekde sia junaĝo kaj fine iniciati en 1887 sian genian projekton de neŭtrale homa Internacia Lingvo. Tiu demando estas abunde pritraktita en nia literaturo. Necesas, tamen, ankoraŭfoje emfazi, ke ekde la komenco li donis al la Internacia Lingvo neŭtrale homan karakteron. Dum la Unua Universala Kongreso de Esperanto en 1905 li emfazis, ke tie, en Bulonjo sur Maro, kunvenis ne Francoj kun Angloj, nek Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj. Tio estas la kvintesenco de tiu science ĝusta koncepto, kiun li nomis, laŭ mi iom neadekvate, interna ideo.

Dum la tuta historio de la Esperanto-Movado troviĝis grupoj, kiuj pro diversaj kaŭzoj — ekde la timo «kompromitiĝi» en «intelektulaj medioj» pro kvazaŭa/mistikismo aŭ sektismo ĝis rekte partipolitikaj motivoj en totalecaj reĝimoj — oponis tiun idean aspekton de la Internacia Lingvo. La lukto pri tiu demando troviĝis sur komplete erara bazo. La esenco reduktiĝis al tio *ĉu oni volas aŭ ne volas doni al Esperanto idean signifon*, anstataŭ ekzameni la demandon, ĉu el socia vidpunkto Esperanto, same kiel ĉiu alia lingvo, *objektive havas aŭ ne havas idean signifon, ĉu Esperanto, same kiel ĉiu alia lingvo, objektive efikas solidarige*, kuntene en rilato al la socia grupo, al kiu ĝi apartenas. La demando altiris mian atenton ekde la unuaj jaroj post la ellerno de Esperanto kaj la rezultoj de miaj tiurilataj studoj estas prezentitaj en la Unua Parto de *Retoriko*, en multaj sekcioj de *Elektitaj Paroladoj*, en konsiderinda nombro da prelegoj kaj artikoloj. Mi fidas, ke mi sukcesis science pruvi, ke la Internacia Lingvo ja havas idean signifon, ke ĝi ja ludas solidarigan rolon, kaj ke Zamenhof esence pravis, kvankam li uzis iom netaŭgan esprimon, ĉar lingvo ne enhavas *internan ideon*, sed efikas eksteren kontribuante al kunligo de la koncerna komunaĵo. Tial mi persone prefere nomis ĝin per la science adekvataj humaneca internaciismo, aŭ humaneco kaj pura internaciismo, aŭ solidariga rolo de la Internacia Lingvo, aŭ simile depende de la kunteksto.

La konataj eventoj de Hamburgo interalie malfermis la pordon por nova kampanjo direktita al kompleta senideigo de Esperanto. La kulmino de tiu kampanjo estas la verko *Socipolitikaj Aspektoj de la Esperanto-Movado*, publikigita en Budapeŝto en 1978. Tiu pseŭdoscienca «marksisma-leninisma» verko estas detale analizita en *Horizonto*, n-roj 2 kaj 3/1980. Por ne longigi mi povas nur peti ĉiujn interesiĝantojn atente tralegi aŭ eĉ relegi la menciitajn artikolojn. Ĉi tie mi deziras aldoni nur kelkajn pliajn vortojn. Por «pruvi» ke Zamenhof malpravis, D. Blanke, la redaktoro de la menciita verko, asertas, ke «la malpacoj en la Esperanto-Movado montras, ke la interna ideo estas malĝusta». Eĉ s-ro W. Krikke en la nederlanda *Komuna Esperanto-Gazeto* n-ro 6/1980, verŝajne ne komprenante la nete politikan karakteron de *Socipolitikaj Aspektoj de la Esperanto-Movado*, rekomendas ĝian legadon kaj en la koncerna artikolo asertas, ke la «origina ideo» de Zamenhof, «ke komuna lingvo montriĝos potenca armilo kontraŭ malamo kaj milito, bedaŭrinde ne estis vera, kion ĉiam denove vidigas la historio» (p. 64).

Nek Zamenhof, nek kiu ajn alia laŭ mia scio kiam ajn asertis, ke Esperanto estas «ideologio», kiel kredigas D-ro Blanke por povi pruvi, ke ĝi «ne estas ideologio». Neniu serioza persono kiam ajn prezentis la Internacian Lingvon kiel ĉiosolvan recepton por forigo de malamo, militoj kaj ĉiuj malbonoj en la mondo. Dum la Dua Universala Kongreso en 1906 en Ĝenevo Zamenhof interalie diris:

*«Ni ne estas tiel naivaj, kiel pensas pri ni kelkaj personoj: ni ne kredas, ke neŭtrala /lingva/ fundamento faros el la homoj anĝelojn; ni scias tre bone, ke la homoj malbonaj ankaŭ poste restos malbonaj; sed ni kredas, ke komunikiĝado kaj konatiĝado sur neŭtrala fundamento forigos la grandan amason de tiuj bestaĵoj, kiuj estas kaŭzataj ne de malbona volo, sed simple de sin nekonado kaj de devigata sinaltrudado.»*

Ellasi tiun esencan kompletigon de la Zamenhofa «interna ideo» signifas falsadi lian penson. Kaj tion oni faras por pure politikaj celoj, por kredigi al la politikaj mastroj, ke Esperanto ne estas *la* «danĝera lingvo», ke ĝi eĉ ne et-ete povas en kiu ajn senco malutili al la totaleca ideologio.

## III

Kiel multfoje klarigite, lingvo estas socia fenomeno, ligita al homiĝo el animala mondo, nedisigeble ligita al evoluo de la socio kaj siavice helpanta tiun evoluon. En tiu evoluprocezo decidan rolon ludis diversaj diferencigaj kaj unuecigaj faktoroj. Al la unuaj, ekzemple, apartenas la geografia (altaj montoj, larĝaj riveroj, dezertoj, k. s.), ekonomiaj-sociaj (kasta aŭ klasa, profesia, okupa k. s.), seksa (interalie tabu-vortoj por virinoj en diversaj komunaĵoj), religia (apartaj religiaj lingvoj ne kiel instrumentoj de komunikado de homo al homo, sed de homo al dio kaj kiel simboloj de religia unueco). Aliflanke troviĝas la unuecigaj faktoroj, ekzemple la ekonomiaj-sociaj (divido de la laboro kaj interdependigo de diverslingvaj sociaj grupoj, sekve influantaj unuecige horizon-

tale, sed diferencige vertikale), priegalecaj ideoj (ekde la religia egaleco en la morto kaj post ĝi ĝis la nuna koncepto pri ekonomia, socia kaj politika egaleco), teknologiaj faktoroj (interalie ĉiaspecaj mekanikaj komunikiloj), klerigaj faktoroj (lernejoj, gazetaro, teatro, televido, radio, literaturo, kulturo ĝenerale).

Ĉiuj menciitaj faktoroj, pli detale prilaboritaj en *Retoriko*, efikas samtempe, influas unu la alian, apogas aŭ neŭtraligas sin reciproke. Tamen, ekzamenado de la tuta historia evoluo sur la lingva kampo evidentigas, ke, paralele kun la evoluo de la homaro, kaŭzita en la lasta analizo de la daŭra progresado de la rimedoj de produktado kaj de la respondaj sociaj rilatoj, la unuecigaj faktoroj fariĝis kaj plu fariĝas ĉiam pli gravaj kaj influaj, dum la disigaj perdas ĉiam pli sian funkcion.

Al tiu historia fakto ŝuldiĝas la ekesto kaj plua evoluo de ĉiuj lingvoj — tribaj, kastaj, klasaj, religiaj k. a. — inkluzive la nunajn normajn naciajn lingvojn kaj la Internacian Lingvon Esperanto.

Ĉiu lingvo, foje ekestinta en difinitaj materiaj kondiĉoj kaj rezulte de difinitaj evoluprocezoj, siavice influas tiujn evoluprocezojn kaj efikas kuntene kiel ia socia cemento en la rilato al la koncerna socia unuo. En la nuntempa epoko de modernaj nacioj kaj malpligrandaj etnoj ĉiu nacia aŭ etna lingvo efikas solidarige rilate la koncernan nacion aŭ etnon, estas la ĉefa identigilo de la menciitaj sociaj kungrupiĝoj. Tiun aŭtomatan solidarigan rolon de la lingvo oni konscie fortikigas per diversaj rimedoj: glorigado de lingvaj kvalitoj kaj kulturaj valoroj, himnoj, poemoj, kantoj, flagoj, ktp.

La Internacia Lingvo, esprimo de internaciismaj ideoj, ekestintaj surbaze de la novepokaj evoluprocezoj de la materiaj fortoj kaj siavice influantaj tiujn evoluprocezojn, same tiel efikas internacie solidarige. Ju pli vasta ĝia utiligo por internacia rilatado, des pli forte sentiĝos tiu solidariga rolo kaj des pli efike ĝi kontribuos al fortikigo de vaste homa — ne «proleta», aŭ aliklasa, aŭ religia, sed vaste tuthoma — internaciismo, kiun mi nomas humaneca internaciismo.

Ekzistas, tamen, grava diferenco inter la naciaj aŭ etnaj lingvoj kaj Esperanto. Dum la naciaj aŭ etnai lingvoj efikas solidarige en rilato al la respektivaj nacioj aŭ etnoj, sed izolige koncerne ĉiujn aliajn naciojn aŭ etnojn, la Internacia Lingvo efikas monde, internacie solidarige, sed sen la izoliga elemento.

Tio estas la kvintesenco de la solidariga funkcio de ĉiu lingvo. Tio estas la kvintesenco de la solidariga rolo de Esperanto, de ĝia idea signifo, de ĝia interna ideo por uzi la Zamenhofan esprimon, aŭ de humaneca internaciismo, kiel mi dirus. Kaj tio havas absolute nenion komunan kun la boneco aŭ malboneco, honesteco aŭ malhonesteco kaj similaj karakteraj trajtoj de unuopuloj.

## IV

Multo estas skribita kaj dirita pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj ĝenerale kaj pri la situacio en Eŭropo kaj en ĝiaj institucioj aparte. La tuta senco, la esenco mem de la demando konsistas precize en la fakto, ke ĉiu lingvo havas sian idean signifon, ke ĉiu nacio aŭ etno ĵaluze gardas sian nacian aŭ etnan lingvon, kaj ke la pli fortaj deziras kaj klopodas altrudi la siajn al aliaj, dum la aliaj firme rezistas.

Se lingvo estus idee sensignifa, se ĝi estus egala al telefono, aŭ aŭtomobilo, la nunaj lingvaj bataloj kaj entute la lingva problemo ne ekzistus. Kaj ankaŭ Esperanto neniam estus ekestinta kaj socie enradikiĝinta.

Krome, se la Internacia Lingvo ludus nenian solidarigan rolon, se ĝi ne estus esprimo de pura, homeca internaciismo, se ĝi ne fortikigus la senton pri aparteno al la plej vasta socio trans la limoj de niaj nacioj kaj etnoj, neniam estus okazintaj la malpermesoj de Esperanto kaj la persekutoj de Esperanto-parolantoj fare de la totalecaj naciismaj reĝimoj, eĉ kiam unuopaj «ideologoj» kaj aliaj gvidantoj de la Esperanto-Movado senvertebre kliniĝis kaj sterniĝis antaŭ la mastroj perfidante la idean valoron de Esperanto.

Ne temas, do, pri tio, ĉu ni volas aŭ ne volas doni al Esperanto idean signifon en la prezentita senco. Temas pri tio, ĉu ĝi objektive havas ĝin pro sia karaktero de internacia lingvo — vere internacia kaj vere lingvo — aŭ ĝi estas objektive senigita de tiu funkcio. Ni ĉi tie kaj multaj dekmiloj, kiuj ne ĉeestas, ne fidas, sed scias kaj konscias, ke la humaneca internaciismo estas nedisigeble ligita al la Internacia Lingvo.

---

**ATENTU**

### ABONO AL «HORIZONTO»

Venonta numero de «Horizonto» estos la lasta numero de la unua epoko de nia revuo.

Ĉar de 1981 ĝi aperos en Danlando, sub la aŭspicioj de ICNEM, (same kiel la ceteraj periodaĵoj), por aboni ĝin vi devas informiĝi de la sekretario/kasisto de la Centro, S-ro H. V. Rasmussen, Bygtoften 8, DK-2800 Lingby, kiu povas informi vin pri la prezo de la jarabono al «Horizonto» kaj de ĝiaj teknikaj, kulturaj kaj informaj trajtoj (momente mi ne konas ilin).

Koran dankon kaj ĝis revido aŭ reaŭdo.

*Inés Gastón*

# PRINCIPOJ DE BATALO

Ne nur la milita batalo, sed ĉiu batalo, ankaŭ tiu por Esperanto, estas regata de la samaj principoj, el kiuj la ĉefa estas la tuja ekspluato de ia sukceso atingita dum la evoluo de la ĝenerala batalo. Povas okazi ke tia agado rezultigos falon de la tuta rezisto en la fronto.

Ĉu estas konceptita kaj aplikita de ni tiu ĉi principo?

Mi opinias ke ne!

Unue, restas neekspluatita le rezolucio de UNESKO. Regadis tiun tempon, post elvenko de la faŝismo, pli bona etoso en la internacia horizonto. La orelo estis preta aŭskulti, en la restaŭriĝanta mondo, ankaŭ aranĝon de la lingva problemo. La eĥoj en la monda gazetaro estis bonegaj. La rezolucio malfermis multajn pordojn kaj ĝia efiko ankoraŭ sentiĝas. Tamen, sur landa nivelo oni faris malmulton, kvankam la tiama respondeculo en eksteraj rilatoj de UEA, la konstruinto de la rezolucio, donadis multajn konsilojn kiel agi. La esperantistaro ne kapablis eniri tra malfermita pordo. Estas vere, ke parte la fortoj elĉerpiĝadis por kontraŭbatalado de la reakciularo ĉirkaŭ la Usonano Connor, sed tio ne praviĝas la nesufiĉan ekspluatadon de tiu signifa Rezolucio, kiu povus silentigi multajn kontraŭdirantojn.

Ankaŭ nesufiĉe ekspluatita restis la amasa peticio de 70 milionoj da subskriboj al UNO. La «generalo» bone konceptis la aferon, sed la «armeo» montriĝis nesufiĉe disciplinita por realigi la koncepton. Ili ĉiuj subskribis, sed poste volis fari *nenion* malgraŭ la multnombra interesiĝo.

Alia neekspluatita fakto estas la freŝdata propono de kvar Italaj parlamentanoj al la Eŭropa Parlamento pri enkonduko de Esperanto en la Eŭropan Komunan Merkaton.

Nun gravaj principoj de batalo eĉ ne estas konceptataj, kiel estas:

1. Principo de enlokigo en la kontraŭe staranta malamika situacio de unu decida celobjekto, kies falo sekvigos necese detruon de la tuta fronto.

2. Principo de aktualeco. La generalo devas juĝi kiam estas la oportuna tempo por lanĉi la atakon.

3. Principo de koncentrigo de la ofensivaj armiloj kiujn oni povas disponi.

En nia batalo prezentiĝas nun, kiel enlokigita grandsignifa celobjekto, la okcidenta Eŭropo. Se Esperanto imponos kiel unika dua lingvo, la aliaj kontinentoj sekvos. Pledas por tio la fakto ke Esperanto estas sufiĉe disvastigita en Eŭropo.

Estas nun aktualeco por agadi tiudirekte ĉar estas formita Eŭropa Parlamento en kiu, se ne kreiĝis, nepre kreiĝos lingva problemo. Ni havis la unuan manifestiĝon: en ĝia unua sesio okazis brua protesto de Italoj ĉar itala deputito parolis franclingve.

Koncerne la paŝon de la kvar italaj parlamentanoj, ĝi ja estas laŭdinda, sed la respondo estis negativa. Plej eble tio ĉi ne okazus, se ĝin sekvus amaso da similaj paŝoj flanke de Eŭropaj Organizaĵoj aŭ de influhavaj personoj. Tia unuopa ago komparebla al ago de generalo kiu, havante antaŭ si gravan malamikan situacion, lanĉas kontraŭ ĝin ofensivon per unu trupeto, anstataŭ surĵeti sur ĝin la tutan armilaron. Kaj kiel ĉi tie, post malsukceso de la ofensivo, la malamiko reordigas siajn fortojn kaj defendajn poziciojn, kaj prezentiĝas pli rezista, pli kruela; same malutilas maltrafa, soleca ago, en la batalo por Esperanto. Ni havas malamikojn kiuj estos avertitaj. La malsukceso en la Konsilio de Eŭropo, en la pasinteco, estu instrua ekzemplo. Eble aliloke aktiviĝos tiudirekte societoj aŭ organizaĵoj aŭ unuopuloj, sed la rezulto estos same magra. Ĉiuj tiaj agoj falos en vakuon, se ili ne okazos en la kadro de strategia plano. Plano kiu antaŭvidu mobilizon de ĉiuj fortoj, kaj kiu prepariĝu ne en sekreto, sed en konsidero de la opinioj de ĉiuj membroj. Sed mi dubas ĉu ekzistas en UEA kia ajn plano, se mi juĝos laŭ tio, ke ĝia organo ESPERANTO ne publikigis ion rilatan. Ĝi preferas kovri siajn paĝojn per publikaĵoj pri planlingvoj, Volapuko kaj aliaj literaturaĵoj anstataŭ esti komunikilo inter la membroj pri gravaj demandoj koncernantaj la finan celon. La estraranoj ŝajnas esti kontentaj en siaj postenoj limigante sin al la rutinaj aferoj.

Estas bedaŭrinde ke en nia gvida organo ne troviĝas la generalo kiu, en konscia respondeco, prenos sur sin la aferon kaj lanĉos la atakon kontraŭ la prezentita celobjekto en strategia plano, diligente pristudita surbaze de la cititaj principoj de aktualeco kaj koncentrigo de rimedoj. Kia domaĝo ke forestas el la gvidpinto de la Asocio Profesoro Lapenna, nun la plej konvena persono en la ĉefa posteno. La kulpuloj pri tio estu malbenitaj.

Konklude, devas mobiliziĝi ĉiuj fortoj kontraŭ Eŭropa Parlamento en strategia plano pristudita surbaze de la cititaj principoj de batalo. La prezidanto de UEA devas okupiĝi persone pri ĝi kaj ne konfidi ĝin nur al iu branĉo de la Asocio, kompetentigita pri tia respondeco. Se ni ne agos diligente kun spirito de vera batalo en konvena tempo, ni perdos la favoran okazon kaj la lingva problemo en la Eŭropa Parlamento kaj Unuiĝonta Eŭropo estos aranĝita per du aŭ tri lingvoj de la grandaj ŝtatoj, kiu kaŭzos novajn problemojn.

*Sokrato Sakellaropoulos*

## ARMAND SU LIBERIGITA

Ĉi-lune, Armand Su, pri vi mi sonĝis
dum migdaluj reklamis la printempon —
poeta frato, ĉina frato, viva
post la dekjara tombo del karcero,
en kiu elsunigis vin, verdulon,
«kulturrevolucio» mise ruĝa.

Vi tamen restis por spikiĝo nova,
rizriĉaj versoj, fasko somerpeza.
Kaj ili, kiuj sciis jam ne legi
sed nur bruligi librojn grandvalorajn,
vandalis vian Bethovenan buston
kaj portretitan murdis nian ĉiam
bonkoran Marjorie?

Pri ilin jen
la histori verdikton jam eldiris,
pli frue ol kutime. Sed vi sciis,
eĉ tiam — preter lum enĉerkigito —
ke la silento estas granda gorĝo
por gluti tiajn tumultulojn, ĉiujn
barbarojn.

Longe via civilizo
jam supervivis siajn atencintojn
kaj rikoltadis en popolosinon
la kulturnovojn, ne pro la koloro,
sed tial ke ekkreskis io nutra
kaj taŭga por la tero del patrujo.

Balaas ver kaj vivo vantojn for,
kaj baldaŭ putros ĉiu gvardiano
al sterka malsuper, dum viaj vortoj
fariĝos — fortaj semoj — la futuro.

Do, Armand Su, ne tro koleru. Dampu
la bedaŭrojn del noktrampintaj horoj,
por ne fordoni vian tutan dolĉon
al amariĝo. Jes, vin diminuis
dek jaroj, kaj multe, multe pli.
Sed mortis la entombigintoj, ĉiuj —
eĉ la zombiaj sklavoj de la stulto
ankoraŭ somnolantaj ĉirkaŭ vi
tra tio kion ili ne komprenos.
Kaj restis viva ĝuste vi, verdulo,
la land antikva kaj ĉi homarujo.

Vi rajtas reesperi, plukantonte
la revojn kiuj restis kaj denove —
per beleksplodoj sur la migdalbranĉo —
promesas primaveron, kaj pretere
kreskadosanon ĝis plenfrukta tago.

Sed se vi seniluziiĝus tute
pri la socio, kiu ŝutas koton
sur ĉion fajnan, aŭ vi vidus plu
ne florojn sed trudherbojn de la miso,
konservu tamen fidon en vi mem.
Kirasu vian praan apartenon
al ni, la poetar, kaj brilblazonu —
per mirostel ankoraŭ, ĉiam, verda —
la ĝojobstinon de la propra koro.

19.8.1980 *Edwin de Kock*

# LA FREMDULO

Li alvenis en la valon pelante la gefilojn kaj la edzinon, lacaj sopiri sur multaj lacigaj padoj. La voĉo de la homo ĉe la trista karavano havis fortan kaj dolĉan influon, pian kiel preĝo.

En la fundo de la vilaĝeto, blanka kaj malriĉa domo, kun sia antaŭpordo malfermita, ricevis ilin favore. La edzino trovis sopiron de espero ripozante sur la fumaĵita benko, apud la bruligita fajrejo; la etuletoj etendis al la ondantaj flamoj siajn frostiĝintajn manojn, kaj la edzo karesis la amatajn infanojn kun triumfa rideto; estis lia la konfido timide ekaperanta en la okuloj de tiu patrino; lia la silenta gajeco de tiuj senkulpuloj: li fieris.

De malproksime li gvatis tiun fruktodonan valon kaj ĝin ambiciis por ripozado de longaj pilgrimadoj. Alvenis la horo realigi sian iluzion: tie estis, finfine, la gastama dometo, ŝirmejo de la vaganta familio; tie la tero kie heroa laboro produktus abundan grenon.

La pova volo de tiu humila homo agis la miraklon. Kompatigita de liaj petegoj, riĉa terposedanto lu-cedis al li la domon kaj la terenojn kontraŭ metoda rento, kiun la nova farmanto deziris pagi akurate. Li rompis, do, kun la vaga ekzistado, kun la hazardaj klopodoj: li estos honesta ano de laborema vilaĝo; li faros al si postenon en la vivo.

Estis kun maltrankvilo de malsatanto kiel tiu homo kultivis siajn kampojn; estis kun avareco de kvieto kaj paco kiel tiu homo vivis en la valo.

Eĉ ne unu horon de stulta babilado en la trinkejo li havis, nek levis en siaj kalaj manoj mavan pokalon da likvoro.

Li teksis silente siajn laborojn, neniam metante sur ilin damaĝan deziron kontraŭ la najbaro, nek kritikon por alies honoro. De la mallumo de lia bohemia vivo restis al li akcento en la parolo, la prunela nigro de la okuloj kaj la bukloj sur la malbrila koloro de bronza haŭto.

Oni eknomis lin la cigano.

Ĉiuj la virtoj pro kiuj li kredis meriti la amikecon de la kamparanoj, servis al li kiel celo de la popola malamo. Ia mistero ekzistis en la pasinteco de homo kiu ne estis blasfema nek trinkema!... Iom terura kaŝis la koro de tiu fremdulo, kies patrujon kaj devenon oni ne konis!...

La gentoj tenis sin for el la malriĉa familio rifuĝinta ĉe la azilo de la fruktodona valo; la forlaso kaj la malŝato sieĝis la blankan dometon.

Vane la edzo daŭrigis susuri konsolojn kun preĝa pieco; jam la edzino ne levis vigle la frunton, kaj ŝiaj okuloj, kie ripozis la paco, malkvietiĝis nebuligitaj de malĝoja vualo. Vidante sian patrinon tiel trista, la infanoj ne kuraĝis ludi nek ridi, kaj pasigis la horojn rigardante kiel la hirundoj, nuraj ne malbonintencaj estaĵoj proksime de la fremduloj, konstruis sian neston en la alero.

Post certa tempo la edzino malsaniĝis: pleja senkuraĝigo kaptis ŝin vidante kiel malsukcesis ŝia lasta iluzio de bonŝanco.

Jam la milda malbonvolo de la najbararo fariĝis ĝena al ili, kaj tagon, manke de kulpulo punenda pro fraŭda arbohakado, la popolo almontris la strangan homon de la prunelaj okuloj kaj la bronza haŭto: ili diris ke li havis ŝtelistan vizaĝon.

Estis atestantoj kontraŭ li; multaj kiuj vidis lin reveni el la kamparo, ĉe profunda nokto, kun la plugilaro sur la ŝultroj, kiam, por anstataŭi la inertajn brakojn de la edzino, la edzo ploris kaj ŝvitis sur la tero ĝis la luno ascendis tre alte en la ĉielon.

Sed kiam li tion diris tiel antaŭ tribunalo, la aŭdantaro aŭskultis lin moke, la juĝistoj ridetis nekredemaj kaj, kun karitataj arogantaĵoj, kondamnis lin al forta monkompenso.

Jam kadukiĝis la aŭtuno kaj estis matura la rikolto de la malriĉa fremdulo: la avidata pano por pacemaj tagoj... La justico konfiskis la grenon, akvumata de ploroj kaj ŝvitoj ĉe la lumo de la arda suno, ĉe la milda brulo de la luno. Kaj denove, la stranga homo de bronza haŭto, pelis sian edzinon kaj siajn gefilojn sur lacigaj padoj, perdita por ĉiam la iluzio de la feliĉo.

CONCHA ESPINA: El «Pastorelas»
Elkastiliigis: Juan Azcuénaga Vierna

## ADIAŬO EL LA DIREKCIO KAJ ADMINISTRACIO DE HORIZONTO

Post kvin jaroj de regula aperado, venonta numero de la revuo metos finan punkton al la unua epoko de «Horizonto», kultura kaj informa revuo de la Neŭtrala Esperanto-Movado.

Dum tiu tempo, mi ĉiam klopodis plenumi mian devon kun la deziro ke mia laboro helpu al la disvastigo de Esperanto, lingvo kaj ideo. Ĉu mi sukcesis — aŭ ne — en mia deziro, vi, pli bone ol mi mem, povas tion konstati. — Nun, kiam post tiuj kvin jaroj de konstanta strebado mi forlasas miajn postenojn en la gvidado de «Horizonto», mi deziras danki unuavice al la membroj de la Redakta Komitato kaj al niaj ĉefaj kunlaborantoj en la diversaj kampoj; dank' al ili la revuo estis inda de nia celo. Kaj ankaŭ, al niaj legantoj, kiuj per siaj leteroj mildigis mian laboron kaj kuraĝigis min al plulaborado.

Ĉar vi legis la REZOLUCION — III, de la VI-a Konferenco de N.E.M., mi deziras klarigi ion, kion mi mem ne komprenas. Temas pri la punkto:

— KONSIDERINTE ..................................................

Mi ne konas pri kiaj *personaj kaj familiaj kaŭzoj* Inés Gastón deziras fini sian laboron ĉe la fino de la jaro. — Laŭ mi diris en 1978, en Jaca, mi intencis forlasi mian laboron en «Horizonto» pro mia alta aĝo, kaj mi jam avertis al kelkaj el la geamikoj, respondeculoj de la revuo pri mia deziro.

Mi naskiĝis en septembro de 1906, mi — same kiel miaj gefratoj —, lernis Esperanton kiam mi ekparolis. — En februaro de 1920 — same kiel miaj gefratoj — mi eklaboris por Esperanto, laŭ mia kapablo, en la bonfara entrepreno «Helpo al Aŭstria Infanoj» organizita kaj realigita de nia patro, Emilio Gastón-Ugarte helpate de aliaj hispanaj esperantistoj, kaj responde al alvoko de la esperantistoj de Graz (Aŭstrio). — Ĉar ni estis edukitaj laŭ la ideo de humaneca internaciismo, nia tuta laboro por Esperanto respondas al Zamenhofa esperantismo. — Je la fino de 1979, pro kaŭzoj ne rilatantaj al Esperanto, mi devis revivigi tiun bonfaran agadon favore al la Internacia Lingvo, per leteroj al la Prezidanto de la Aŭstria Respubliko kaj al la Reĝo de Hispanujo. — Jen koincido, post sesdek jaroj de konstanta aktivado en la Esperanto-Movado, en februaro de 1980, mi ricevis la respondon de S-ro Prezidanto de la Aŭstria Respubliko pri tiu agado.

Denove koran dankon al ĉiuj. Mi ne diras adiaŭ, ĉar mi ne foriras el la Esperanto-Movado; male, mi restas preta plulaboradi sur la vojo de humaneca internaciismo, kiun Dro. Zamenhof montris al ni per sia neŭtrala uzado de la lingvo.

*Inés Gastón*

## AKTO PRI FONDO DE LA INTERNACIA CENTRO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO - MOVADO

Ni, subskribintoj, deklaras, ke ni kontribuis por la revuo HORIZONTO pli ol 15.000 pesetojn ĝis la 1-a de aŭgusto 1980, kaj konforme al la artikoloj 5.1.1 kaj 6.1.4 de la statuto, akceptita de la 6-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado en Strasburgo la 31-an de julio 1980, rigardas nin fondintoj de la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado («La Centro»).

Ni rajtigas la provizoran Plenuman Komitaton konsistantan el:

Prof. D-ro Ivo LAPENNA, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Mddsx, GB, Prezidanto,

D-ro Klaus PERKO, Lendkai 111, A-8020 Graz

S-ro Jean THIERRY, 5 rue Léon Cogniet, F-75 017 Paris

F-ino Marianne VERMAAS, Nieuwe Binnenweg 70, I, R, 3015 BC Rotterdam, Vicprezidantoj,

S-ro Henry Vestergaard RASMUSSEN, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Sekretario-kasisto,

entrepreni la necesajn paŝojn por funkciigi la Centron kun sidejo en Danlando kaj havigi al la Centro juran personecon laŭ la dana juro.

Tiu ĉi akto estas malfermita por subskribo ankaŭ al tiuj, kiuj plenumas la kondiĉojn laŭ la artikolo 5.1.1 de la statuto ĝis la 1-a de oktobro 1980.

La administra adreso de la Centro estas: H. V. RASMUSSEN, Bygtoften 8, 2800 Lyngby, DK

En Strasburgo, la 1-an de aŭgusto 1980

Dro Lapenna, Adda Sakelaropulu, M. Muller, En nomo de C.E.P.E. Jean Thierry, Klaus Perko, Peter Zacho, Elisabeth Thune, Daniel Luez, M. Thierry, Rie Krainer, M. Vermaas, Walter Kaukal.

(el prelego de Jean Thierry en la IV-a Internacia Konferenco de NEM en Jaca 1978)

De 1947 ĝis 1974 neniam venis en la kapo al iu ajn samideano eĉ nur la impulso riproĉi la 4-an artikolon de la UEA-statuto, kiu proklamas la respekton al la Homaj Rajtoj kiel esencan kondiĉon de ĝia laboro...

Nur en 1979 ekestis legeblaj en ESPERANTO-REVUO (oficiala organo de UEA) kritikoj kontraŭ la mencio de la Homaj Rajtoj en la statuto!

(daŭrigo)

## II LA NUNA STATO DE LA POSTHAMBURGA PERIODO

Kiel UEA perdis sian partipolitikan neŭtralecon, kaj precipe kia estas ĝia nuna stato en la Esperanto-Movado, jen demandoj kiuj postulas ankoraŭ iom da historio, sed freŝa historio.

Krom la aparta kazo politika de la usonano G. A. Connor solvita en 1956, ĝis 1968 nur envio kaj ĵaluzo direktis sagojn kontraŭ la prezidanto de UEA. La atakoj estis personaj, lerte dissemitaj — aŭ en HEROLDO tuj de kiam ĉi tiu gazeto estis redaktata de s-ino Ada Fighiera-Sikorska, — aŭ per leteroj kaj kontaktoj ekde 1964. Kio cetere pli kaj pli akcentiĝis: eĉ baldaŭ estos uzataj anonimaj telegramoj sed tiam je la servo de politikaj celoj.

Efektive post la eventoj de 1968, kaj ĝuste en la 25-a Internacia Junulara Kongreso de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo en Tyresö (Svedio - Kongreso de aŭgusto 1969) la gejunuloj sub la prezidado de HUMPHREY TONKIN voĉdonis rezolucion, kiu pro interpretaj eblecoj malfermis la pordon al ĉiaj politikaj agadoj. Interalie enestas en la teksto instigoj, kies postaj interpretoj tra la kolumnoj de la TEJO-gazetaro devojiĝis nete partipolitikaj.

> *En pluraj prelegoj kaj diskutogrupoj kun la ĝenerala temo «Junularo kaj Socio» ni pristudis la nuntempan radikalan ŝanĝon de la rolo de la junularo en la socio, kiu montriĝas en intelekta kaj politika mobilizo de la junularo.*[1].
>
> *La lingvo estas realaĵo intime ligita al sociaj kaj politikaj fenomenoj. Tial ĉiuj ajn aktivecoj pri lingvaj problemoj estas samtempe sociaj aktivecoj...*
>
> *La mobilizo de la junularo estas subtenenda kaj partoprenenda batalo por la digno de la homo...*
>
> *Ni alvokas ĉiujn homojn kaj junularajn organizojn al solidariĝo kaj laŭeble kunlaboro en tiu agado de TEJO.* (Substreko mia.)

Per siaj komentoj en «ESPERANTO EN PERSPEKTIVO» Ulrich Lins mem, tiam ankoraŭ en TEJO, substrekas la deflankiĝon:

> *La 25-a IJK fariĝis do mejloŝtono en la historio de TEJO, kiu profunde ŝanĝiĝis dum la tridek jaroj inter la Junulara Marŝo de Tervuren kaj la Deklaracio de Tyresö kaj kiu ankoraŭ en 1962 spertis ardajn diskutojn pri la demando, ĉu TEJO povas prezentiĝi en kongresoj de neneŭtralaj organizaĵoj. Nun, en 1969, TEJO-anoj iris eĉ surstraten, farante protestan demonstracion kontraŭ lingva imperiismo en la magazena kvartalo de Stockholm. Post Tyresö, ankaŭ la NEJO-Komisiono eniris novan ŝtupon de sia agado, difinante sian celon ĉefe «protesto kontraŭ kultura kaj lingva superregado». Kaj el prava fiero pri sia prestiĝo, fontanta en multjara konscienca laboro, ĝi ĉerpis kuraĝon por proklami, ke TEJO ne intencas trudi Esperanton al reakciaj organizaĵoj...*
>
> *Sekvante la spiriton de Tyresö, la Kongresoj de TEJO nun alprenis la karakteron de forumo, en kiu la partoprenantoj priparolas difinitan kongresan temon aparte aktualan: en Graz, en 1970, oni diskutis pri «Junularo kaj Lernejo - Ejo de la Revolucio».*

De tiam kompreneble la organizaĵoj de la tiel nomataj socialismaj landoj de Orienta Eŭropo ne eraris pri la signifo de tia Deklaracio, des pli cetere ke la du vicprezidantoj de la tiama TEJO estis membroj de komunista politika partio; sekve al tio la asociaj reprezentantoj de la socialismaj landoj komencis ekde 1970 kunveni inter si en la sekretaj kunvenoj de la tiel nomataj «Konsultiĝoj»!

Post la petolaĵoj de TEJO en Vieno kaj Graz, kie «maŭistoj» eĉ eksplodigis bombetojn dum la balo; — post la deklaro en «KONTAKTO» de d-ro TONKIN «*La debatoj de la kongreso larĝe pritraktis la problemojn de propra ideologio de la esperantista junulara movado kaj ĉefe la sencon de ĝia neŭtraleco*»; — post la deklaroj de M. Dobrzynski «*La neŭtraleco trovis sian ekstreman, preskaŭ absurdan, esprimon en la Statuto de UEA kaj sekve en tiu de TEJO...*» kaj precipe: «*La deklaracio* (de Tyresö) *ne nur ne timas enmiksiĝadon en la politikon, sed simple akceptas politikan vid-*

*punkton de la aprezado de la lingva problemo»*; — post la proklamo en KONTAKTO: *«TEJO ankoraŭ serĉas sian vojon el la mucida neŭtraleco, kiu tiel senefikas la plenkreskulan movadon»*; la tiama estraro de UEA (en kiu mi partoprenis) tute demokrate decidis, ke la debato de la Universala Kongreso en Londono (1971) temos pri la demando, ĉu la nuna koncepto de la neŭtraleco de UEA ankoraŭ estas adekvata. Longa kaj vigla diskuto kun voĉdono: grandega plimulto de verŝajne ĉ. 500 personoj (kontraŭ nur 7 voĉoj) konfirmis, ke la neŭtraleca formulo ankoraŭ restas konforma al la bezonoj de la Asocio en la nunaj kondiĉoj.

Spite tion, kaj dum daŭris intertraktadoj pri pli firma integriĝo de TEJO en UEA, sinsekvis jenaj temoj: — en kongreso de TEJO, en Sarajevo «Junularo kaj Hommedio»; — en seminarioj de la NEJO-Komisiono, en Strasburgo «Lingvo kaj Kulturo» (prilumitaj el lingvistika, sociologia kaj ideologia vidpunktoj), kaj en Parizo nete «Lingvo kaj Politiko». Multiĝis ankaŭ la artikoloj kontraŭ la neŭtraleco en diversaj gazetoj sed ĉefe en KONTAKTO, en kiu skribis R. Cash ekzemple: *En TEJO oni jam ne plu malŝparas sian tempon diskutante pri 'mucida neŭtraleco' — tiu temo estas 'morta mefito', ĝi estas 'forgesita miozoto'... Nur en kelkaj 'maturaĝaj' rondoj oni ankoraŭ priflaras kaj palpetas la kadavron.* Tial ĉu mirinde, se iu el la «konsultiĝoj» de la gvidantoj de la socialismaj landoj konspiris kun la ĵus alvenintaj reprezentantoj de TEJO en la UEA-Komitaton kaj kun kelke da ambiciuloj por faligi tiun, kiun ili mem nomis *«la bastiono de la neŭtraleco»*?

Estas memorigindaj kelke da eldiroj de la konspira proparolanto s-ro Aleksiev, interalie kiam li rifuzis pritrakti la projekton de principaro pri elekto de komitatanoj C, kvankam la entagordiĝo estis konforma al la decido de la Komitato en Londono; — ankaŭ kiam li proponis ne diskuti pri la meritoj de la kandidatoj, dum mi kontraŭdiris, ke elekto ja ne estas loterio kaj nepre necesas iel prezenti la kandidatojn... Sed ĉi-rilate sufiĉas relegi la protokolon de la kunsidoj en Hamburgo. La konspiro estis tiel evidenta, ke ĝi provokis plurajn eksiĝojn tute prisilentitajn de «ESPERANTO»-revuo. Tuj de la 2-a de aŭgusto 1974 prof. G. Waringhien skribis al la nova prezidanto Humphrey Tonkin jenan leteron:

> *Konsiderante la cirkonstancojn, kiuj akompanis la demision de Prof. D-ro Ivo Lapenna, kaj la manieron, kiel la Komitato de U.E.A. malakceptis miajn amikojn kaj kunlaborantojn Prof. D-ro Paul Neergaard, D-ro John Wells, S-ino Emilja Lapenna, mi volas ne kontraŭstari la deziron pri ŝanĝo, kiu animis la Komitaton, nek difekti per mia ĉeesto, eĉ sur malgrava loko, tiun belan ekzemplon de «harmonie préétablie»*, kiel dirus nia Leibnitz.*
>
> *Mi do demisias la prezidantecon de la Belartaj Konkursoj. Ne estos malfacile al vi trovi pli junan kaj kompetentan personon por anstataŭi min, kaj mi jam nun deziras al li plej brilan sukceson. Sindone via.*

(* antaŭfiksita harmonio)

Same estis pri la eksiĝoj de s-ro Roger Bernard kaj f-ino M. H. Vermaas: plena silento! Persone mi ricevis preman leteron de la tiam elektita estraro, por ke mi rezignu la publikigon de mia deklaro al la Komitato en la 3-a de aŭgusto:

> *El ĉio, kion ni travivis en la Komitato dum la semajno — de skandalo al skandalo, ekde tiu plej granda, kiu estas la nedeca konduto rilate al nia prezidanto prof. d-ro Ivo Lapenna — sekvas, ke la neŭtraleco jam ne regas en la Komitato, kies plimulto de du trionoj emas buŝumi la lastan trionon laŭ metodoj de fama politika partio.*
>
> *Tion — kolegoj de la plimulto — vi intencis, vi deziris, vi sukcesis kaj tiel detruis la UEA de Hodler, Privat kaj Lapenna. Elektite de la delegitaro tra la mondo, por kio mi utilus en tiaj cirkonstancoj, se ne por servi kiel garantiulo de ia pseŭdo-neŭtraleco, eĉ pseŭdo-demokrateco? Kaj mi ne garantios tian trompon de la publiko.*
>
> *Pro tiuj motivoj, estimata prezidanto, mi simple deklaras, ke mi eksiĝas el la Komitato. Adiaŭ.*

Sed mi ne pli insistos, ĉar se estas utile fojfoje revoki gravajn aferojn, ĉiuj detaloj de la komploto estas legeblaj en HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO.

Ni prefere konstatu la rezultantan staton. Gin karakterizas la superregado de la komplotintoj en la gvidaj postenoj kaj ne nur en UEA sed ankaŭ en multaj landaj asocioj, eĉ ne nur per influo sur la estraron aŭ en ĝi, sed ankaŭ (eĉ precipe) per la sistemo de la komisionoj, kies gvidantoj ili estas. Kompreneble pro la ekzisto de NEM, kiu plu portas la tradician torĉon de la humaneca internaciismo kun koncepto de aktiva neŭtraleco, — kaj precipe pro la publikigado de HORIZONTO, kiu, fariĝinte konscio kaj konscienco de la Esperanto-Movado, tre zorge observas ĉiun agon de UEA, — ĝis nun la membroj de la «socialistaj» landoj atentas (kiel antaŭ 1968) kiel eble plej diskrete manifestiĝi kvazaŭ por forgesigi sian venkon kaj superregadon, sed tio ĉi estas nur momenta oportuna taktiko: ili ja ludas similan rolon kiel en la fama usona televido-filmo tiun de «LA INVADANTOJ»!

Dume, jam en la du ĉefaj gazetoj ESPERANTO kaj HEROLDO precipeco estas ĉiam donata al la faktoj okazantaj en la komunistaj reĝimoj, kaj al la ideoj kaj teorioj tie presataj; kompense de tempo al tempo aperas artikoloj direktitaj kontraŭ okcidentajn esperantistojn, kiel al prof. G. Waringhien pro la gramatika kategorieco de la radikoj kaj neologismoj aŭ pro laŭdire politikaj difinoj de la Plena Ilustrita Vortaro; aŭ kiel al R. Schwartz, kies ĉefverko «Kiel akvo de l'rivero» estus laŭ recenzo aperinta en HEROLDO monumento de gramatikaj eraroj kaj galicismaj sintaksoj. Oni eĉ ne hezitis lastatempe paroli pri «*okcidenta dialekto de Esperanto*»! Pli celtrafan argumenton al kontraŭuloj de Esperanto oni ne povus doni! La celo estas duobla: kreskigi la prestiĝon de la esperantistoj el la tiel nomataj socialismaj landoj kaj subfosi tiun de la okcidentaj elstaruloj. Tre konata kampanja sistemo!

Dume regas totalisma cenzurado kun prisilentado de iu ajn kritiko aŭ malplaĉa deklaro, kaj eĉ rifuzo aperigi «nelaŭnormigitan» artikolon aŭ komunikaĵon, kiel atestas mem d-ro G. Salan:

> *Ĉar ekzistas libera tribuno nek en ESPERANTO, nek en HEROLDO de ESPERANTO, ĉar la abonantoj tute ne rajtas esprimi sian starpunkton en la ĉi-supre cititaj organoj, ili do devas mem ĝin publikigi kie kaj kiel ili povas.*

Tion atestas ankaŭ la konstanta rubriko de HORIZONTO titolita «Kion vi ne legos aliloke».

Dume — kaj spite la statuton de UEA kaj ties deklaron pri respekto al la Homaj Rajtoj — Humphrey Tonkin malakceptis eĉ nur prezenti al la Universala Kongreso la Manifeston 77 kaj la telegramon pri Juri Belov, kiel atestas denove d-ro G. Salan:

> *Je la tribuno de la 62-a Universala Kongreso Tonkin trovis sufiĉe da tempo por laŭtlegi la poresperantan rezolucion voĉdonitan de la pariza Kongreso de la mondcivitanoj.*
>
> *Li sendube ne tro bonkore tion faris pro la ĉeesto en la aŭskultantaro de esperantistaj reprezentantoj kvazaŭ oficialaj de kelkaj Orienteŭropaj ŝtatoj, kiuj (mi ne parolas pri ĉi reprezentantoj, sed pri iliaj ŝtatoj) estas — kiel bone sciate — ĝisostaj ŝovinistoj.*
>
> *Tonkin tamen eĉ ne unu solan vorton diris pri:*
>
> *1. La Manifesto 77 al li sendita de NEM-o, por ke li ĝin prezentu al la UK.*
>
> *2. La telegramo al li sendita de la 3-a Internacia Konferenco de tiu sama NEM-o pri la kontraŭleĝa enkarcerigo de unu sovetia esperantisto Yurij Belov en mensa hospitalo en Krasnojarsk.*
>
> *Kion do signifas tiu silento? Unue, ke Tonkin tute ne deziras plaĉi al Ivo Lapenna, due, ke li tute ne deziras malplaĉi al d-ro Blanke kaj al s-ro Aleksiev.*
>
> *Oni do devas konkludi, ke la UEA-neŭtraleco havas siajn devojn kaj la rajto pri komunikado siajn politikajn limojn.*
>
> *Ĉu iu ajn povus dubi pri tio?*

Tiel parolas la aŭtoro de «La nuda vero», de tiu raporto pri propraj travivaĵoj en kelkaj naziaj koncentrejoj, la tradukinto de la mondfama romano de Arthur Koestler «La Nulo kaj la Senlimo». Estus ja interese ekscii de H. Tonkin mem, pro kiuj motivoj li ne prezentis la tekston de la MANIFESTO 77 de la ESPERANTO-MOVADO. Eble la lastaj linioj de la manifesto klarigas tion; ĉiuokaze ili bone proklamas la «humanecan internaciismon»:

> *... Ni rigardas la respekton al la homaj rajtoj ne kiel malvastan partipolitikan aferon aŭ, eĉ malpli, kiel eblan objekton de partipolitika marĉandado, sed kiel ĝenerale homan valoron per si mem kaj, samtempe, kiel kondiĉon de daŭra paco, je kiuj ĉiu homo estas egale interesita, kaj al kiuj la uzado de la Internacia Lingvo jam konsiderinde kontribuis kaj povas kontribui eĉ pli en la estonteco. Konvinkitaj, ke la plena ĝuado de la homaj rajtoj ĉie sur nia terglobo estas same tiel ne dividebla, kiel la monda paco, ni agis kaj plu agos laŭ la principo: POR PACO EN LIBERECO — POR LIBERECO EN PACO.*

Pri la telegramo koncerna al s-ro Belov, Humphrey Tonkin, tamen, provis klarigi sian sintenon en letero de la 10 oktobro ricevita de la prezidanto de la 3-a Internacia Konferenco de NEM cetere nur la 3-an de novembro 1977:

> *Laŭ mia propra konvinko, kaj laŭ la konsiloj de la Komisiono pri Kongresaj Rezolucioj, kiu laboris dum la 62-a Universala Kongreso en Rejkjaviko, mi povas respondi al via telegramo laŭ la jena senco.*
>
> *Nia Asocio havas gravan respondecon stimuli diskutadon kaj esploradon pri la homaj rajtoj inter parolantoj de Esperanto kaj precipe inter niaj membroj. Tiu respondeco estas eĉ difinita en nia Statuto.*
>
> *Pro tio, ekzemple, ni elektis kiel ĉeftemon de la kongreso en Rejkjaviko «la Rajton je Komunikado». Pro tio, ni partoprenis en la laboro de la Inter-*

*nacia Jaro de la Virino (1975) kaj daŭre kontribuas al la Jardeko kontraŭ Rasismo.*

*Ni samtempe havas respondecon krei kondiĉojn en la unuopaj landoj, en kiuj aktiva, libera Esperanto-movado povas disvolviĝi ĝis maksimumo.*

*Sekve, ni havas devon interveni se okazas atencoj kontraŭ parolanto de Esperanto pro tio, ke li/ŝi parolas la Internacian Lingvon, aŭ kontraŭ landa Esperanto-movado pro tio, ke Esperanto mem estas juĝata danĝera. Aliflanke, la neŭtraleco de UEA ne permesas, ke ni intervenu pri specifaj kazoj fremdaj al tiuj du kondiĉoj.*

*Laŭ la sugesto de nia Komisiono pri Rezolucioj, ni esploras la situacion de s-ro Belov kaj agos konforme al niaj eltrovoj. Se pri tiu afero vi mem posedas precizajn kaj objektivajn informojn, ni akceptus ilin kun danko.*

Antaŭ ĉio oni povas rimarki la potencan influon de la Komisiono pri Rezolucioj, kiu ne juĝis utila prezenti eĉ simple al la Komitato kaj la Manifeston 77 kaj la telegramon. El la argumentaro oni facile konstatas, ke la Komisiono apriore limigas la intervenojn de UEA je du kazoj, nome *se okazas atencoj kontraŭ parolanto de Esperanto pro tio, ke li/ŝi parolas la Internacian Lingvon, aŭ kontraŭ landa Esperanto-movado pro tio, ke Esperanto mem estas juĝata danĝera.* Estas dubinde, ke tia limigo kongruas kun la artikolo 4. de la tiama statuto. Sed koncerne *«diskutadon kaj esploradon pri la homaj rajtoj»* estas same dubinde, ke la temo mem en Rejkjaviko kongruas ĉi-foje kun la limigo. Kio fariĝas ja la Rajto je Komunikado, se sufiĉas esti konsiderata kiel «civitano kun kontaktoj al eksterlando» por esti tuj akuzita kaj baldaŭ kondamnita pro laŭdire «kontraŭsoveta agitado kaj propagando»? Kompreneble la kulpigo ne estas «paroli esperanton», sed «paroli al eksterlando». Kaj por kio servas Esperanto? Vere la respondo estas perfekta ekzemplo de kazuistiko! Des pli ke la estraro de UEA ne turmentas sin per similaj skrupuloj, kiam temas pri la permeso lasita al iu asocio entrudiĝi en la internajn aferojn de Grekio... Nur por «AMNESTY INTERNATIONAL» la estraro rifuzas la permeson disdoni flugfolion, kaj jam por la dua fojo!

Ĉe la fino de tiu historia trarigardo kaj nuntempa konstato oni rajtas demandi sin, kiuj el la nunaj gvidantoj de la Esperanto-Movado restas ja fidelaj al la fundamentaj ideoj de la esperantismo kaj al si mem.

La principo de neŭtraleco, kia ĝi estis en UEA ĝis 1974 nome aktiva, pozitiva rezultas el la universaleco de la Lingvo Internacia, kiu povas kaj devas esti uzata kiel ĉiunacia, ĉiueklezia, ĉiupolitikpartia, kaj tial ne devas fariĝi la instrumento de unu sola politika partio; sed ankaŭ el la universaleco rezultas la principoj de «humaneca interniaciismo» propra al la uzado de la Lingvo, antaŭe tradicie nomata «interna ideo», kies ekzisto-kondiĉoj postulas la respekton al la homaj rajtoj.

Estiĝis ia konfuzo, kiu malebligas distingi inter propra politiko kaj aliĝo al la ideologio de aparta ekstera politika partio. Neŭtrala en iu ajn konflikto signifas esti nek por unu nek por alia ekstera partio; sed memkompreneble, ke lingvo komuna prezentas politikajn konsekvencojn: la ideo mem de lingva komuneco ne povas ne supozi kelkajn kondiĉojn kaj deduktojn. «*La Esperantismo celas la reciprokan sinkomprenadon,* deklaras d-ro L. L. Zamenhof, *kaj konsekvence ankaŭ estimon kaj amon inter ĉiuj gentoj kaj nacioj*». Tiel la ĉefaj entenataj elementoj estas jenaj: — solidara frateco inter ĉiuj homoj (*Mi estas homo; homa nenio al mi fremdas,* laŭ la fama eldiro de la latina poeto Terencio); — rajta egaleco inter ĉiuj grupoj (de kiu ajn speco: genta, lingva, religia aŭ sociklasa); — kaj plena libereco pri la cirkulado de la ideoj kaj homoj (sen kiu libereco iu ajn komuna lingvo restus senutila!); — unuvorte, nenia diskriminacio de homoj aŭ homaj aroj, kiuj kompreneble observas ĉi tiujn samajn principojn de Homaj Rajtoj.

Kaj ĉion ĉi ne pretervidis enciklopedia redaktinto eĉ ekstermovada, kiel tiu de «ENCYCLOPEDIA UNIVERSALIS», kiu sur la paĝo 644 ĉefine verkis:

> *Ne estas unu ekzemplo de lingvo, kiu ne estis en la komenco portata de politika komunaĵo, antaŭ ol esti pro kulturaj aŭ religiaj kaŭzoj (kiel la latina kaj la katolikismo) aŭ pro kaŭzoj de ekonomia aŭ politika superregado (kiel la angla jam de cent kvindek jaroj) etendita al aliaj komunaĵoj. Oni nepre konstatas, ke Esperanto proponas sin surbaze de spirita komunaĵo sen politika-ekonomia grundo.*

Kaj el tia cetere prava konstato li bedaŭrinde sekvigas tro rapidan konkludon, ke *oni povas dubi pri la sukceso de tia entrepreno,* kvazaŭ ĉio en la mondo nepre disvolviĝus ĉiam laŭ la sama magia rondo! Nu, same prave oni povus subteni la malan aserton, ke ĝuste pro kulturaj aŭ religiaj, ekonomiaj aŭ politikaj kaŭzoj ĉiu etna lingvo, disvastiĝinte ekster sian denaskan teritorion, estis fine forĵetita kiel heterogena greftaĵo, — aŭ misformita, disformita de substratoj tiagrade, ke ĝi naskis novajn lingvojn, kiel atestas la latina lingvo! Kaj ĝuste pro nure «spirita» sed universala komunaĵo Esperanto estas la sola lingvo internacia «laŭ konsisto kaj destino», kiu kapablas enradikiĝi, provokante nek forĵetadon nek misformiĝon, ĉar laŭ la Bulonja Deklaracio de 1905 «*neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn,* kiuj cetere konsistigas ĝiajn proprajn radikojn.



"Agadi per lernolibroj, anoncoj, k.t.p. estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon *apud* la literaturo kaj ne *anstataŭ* la literaturo."

*L. L. Zamenhof*

# LIBROJ SUB LA LUPEO

SKIZOJ, Peter Altenberg. Trad. Grete Breunlich. Eld. Aŭstria Esperanto-Instituto, Vieno 1980. Broŝurita, 13 × 21 cm. 32 p. Prezo: 36 aŭstriaj ŝilingoj.

Tridek tri titoloj prekaŭ anekdotaj konsistigas la bele presitan libreton. Peter Altenberg estis en sia juneco unu el tiuj homoj netaŭgaj, socie ne modleblaj, kiuj tamen laŭ la tempopaso rivelas specialan personecon kaj kapablon ne ordinaran. Liaj ne longaj anekdotaj rakontoj (en tiel strikta lingvo, ke ĝi foje limas la ne tujan kompreneblecon) estas interesaj kaj pruvas ke la aŭtoro sciis enrigardi la homan animon.

Kvankam klara, la Esperanta prezento bedaŭrinde iafoje lamas en la korekteco: komenci (komenciĝi); *de* doni, *de* donaci; trovanta (troviĝanta); banis (baniĝis); etuloj (uletoj); finlerninta (ellerninta); ne jam (ankoraŭ ne); indiskretaj (maldiskretaj); unu de viaj (unu el viaj); nuligata (nuligita); fanatismo; mi direktis (direktiĝis); finis (finiĝis); k. a.

Kial oni ne klopodas, ke alilanda kompetentulo reviziu la verkojn antaŭ la publikigo? Certe oni legos kun plezuro tiun kolekton de iel psikologiaj, diversaj temoj.

Turnu vin al Aŭstria Esperanto-Instituto, A-1150 Wien.

*Salvador Gumá*

HISTORIO DE ESPERANTO — Skizo kompilita de D-ro Karl Beckmann, 11 paĝoj. Eld. Aŭstria Esperanto-Instituto. Prezo: 9 aŭstriaj ŝilingoj.

Jen bele prezentita historiresumo, tre klare presita. Eble tial mi ellegis ŝate ĝian interesan enhavon, kiu ampleksas de antaŭ la apero de Esperanto ĝis post la dua mondmilito. Ĝi prezentas la necesan materialon por ke oni sciu kiel estiĝis, prosperis, kaj vastiĝis Esp-o malgraŭ krizoj, skismoj, kaj militoj. Tamen mi ne konsentas, ke Zamenhof (pĝo 4-a) sciis nenion pri antaŭaj provoj de lingvo internacia. Stranga hazardo estus, ke Bonifacio Sotos en la j. 1850-a, kaj Rimann en la j. 1877-a markis la tri verbotempojn per A, pret. E, prezenco, I, futuro, kaj ankaŭ Zamenhof antaŭ la j. 1887-a elektis tri vokalojn I, A, O, por la sama celo!!

Aliflanke, pro la puĉo en Hamburgo (j. 1974-a) multaj adeptoj de Neŭtralismo ĉesis esti membroj de U.E.A., *sed ili ne fondis novan Organizaĵon* (N.E.M.); «Horizonto» estas sendependa gazeto speciale efika kontraŭ la cenzuro en la organo de U.E.A.; kaj la Neŭtrala Esperanto-Movado ĉesos ekzisti tuj kiam neŭtraliĝos U.E.A.

La Historia Skizo de D-ro Karl Beckmann estus lingve plene korekta se ne enestus pluraj eraretoj. — Turnu vin al Aŭstria Esperanto-Instituto, A-1150 Wien.

*Salvador Gumá*

ENKONDUKO AL LITERATURA KRITIKO, Giorgio Silfer, Eld. Someraj Universitataj Kursoj, Librofako de Literatura Foiro, Lieĝo 1978. Ofsete eldonita, 21 × 30 cm. 41 paĝoj. Prezo ne indikita.

Tiu verko temas pri studo originale verkita en Esperanto. Ĝi dividiĝas en 7 ĉapitrojn, sub jenaj titoloj: Stilistiko kaj Kritiko — Estetiko kaj Poetiko — Poezio kaj Prozo — Elementoj de Metriko — La Tropa Parolo — La Literaturaj Ĝenroj — La Esperanta Kritiko.

Pro la intereso de la temo kaj la klareco per kiu ĝi estas prezentita mi rekomendas sian studadon al ĉiuj, kiuj interesiĝas pri literaturaj temoj.

ENKONDUKO EN LA INTERLINGVISTIKON. Red. T. Carlevaro kaj G. Lobin. Alsbach: Leuchtturm-Verlag. 1979. 263 paĝoj, 15 × 21 cm. Eŭropa Serio «Sennaciigita Scienco». Referaĵoj de Szerdahelyi, Carvelaro, Frank, Sonnabend, Münnich kaj Zlatnar. Kun resumoj en la germana. Prezo: 33,90 gld.

INFERO. Dante Alighieri, en la trad. de K. Kalocsay. Eld. Librofako de Literatura Foiro, La Chaux-de-Fonds/Milano, 1979. 280 paĝoj, 15 × 22,5 cm. Prezo ne indikita.

La libro estas represaĵo de la eldono de Literatura Mondo, Budapest 1933. Postparolo de Prof. G. Waringhien, Paris 1979.


Ni devas danki al la Librofako de L. F. la novan eldonon, per ĝi, la novaj esperantistoj povos ĝui tiun majstran tradukon.

65-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO. Kongresa Libro 1980. Eldono de U.E.A., 136 paĝoj, formato 14 × 20,5 cm.

Kiel kutime ĝi enhavas la programon kaj informojn pri la kongresa urbo kaj lando, Stockholm (Svedio).

# VII-a INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

12-18 julio 1981



*Altlernejo Krogerup, Humlebæk, Danlando*

Korespondadreso: H. V. Rasmussen, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby

OFICIALA INFORMILO N-RO 1

*1. Organiza Komitato.* Laŭ decido de la 6-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado en Strasburgo la 7-a Konferenco okazos en Danlando, kie nun funkcias Organiza Komitato konsistanta el s-ino *Rie Krainer*, s-ino *Lis Thune*, s-ro *P. Zacho* kaj s-ro *H. V. Rasmussen*, kiu lastnomita estas prezidanto kaj kasisto.

*2. Loko kaj tempo.* Pro bonaj spertoj pri la loko de la 3-a Konferenco en 1977 la Organiza Komitato elektis por la venontjara konferenco la saman lokon, *Altlernejo Krogerup* en Humlebæk apud la markolo Sundo, ĉ. 35 km norde de Kopenhago (København) kaj 10 km sude de Elsinoro (Helsingør). La ĉefdomo de la altlernejo, kiu situas en granda malnova parko tuj apud arbaro, estas 200-jara palaceto de iama sinjorbieno. La kunvenaj salonoj kaj la dormoĉambroj estas en novaj alkonstruitaj aloj, kio donas idealajn kondiĉojn por la konferenco.

La vilaĝo Humlebæk troviĝas proksime al la naturaj, arkitekturaj kaj kulturaj vidindaĵoj de Norda Selando, kiu estas konsiderata unu el la plej belaj kaj interesaj regionoj de Danlando. Humlebæk havas fervojan stacion sur la linio Kopenhago-Elsinoro, kaj ĝin trapasas pluraj aŭtobusaj linioj.

La konferenco okazos dum la semajno de dimanĉo la 12-a de julio ĝis sabato la 18-a de julio 1981, la sola konvena semajno, en kiu la altlernejo ne estis jam rezervita.

*3. Provizora programo.* Per ĝenerala voĉdono la Statuto de UEA estis ŝanĝita en la nuna jaro, per kio estis leĝigita la aliĝo de neneŭtralaj landaj asocioj. La ĝisnuna strebado de NEM do ne havis la celitan rezulton, kaj NEM tial devas ŝanĝi sian agadon. Tio esprimiĝis per la fondo de la *Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM).*

NEM devas nun celadi al kunlaboro kun UEA kaj ĉiuj aliaj Esperanto-organizaĵoj kaj -instancoj, se ili deziras tion, pri aferoj de komuna intereso malgraŭ ĉiaj diferencoj de opinio en aliaj rilatoj. Unu el tiuj aferoj estas la 100-jara jubileo de Esperanto en 1987, kiu estu zorge kaj celkonscie preparita, por ke la celebrado povu okazi en digna kaj impresa maniero. Tial la Organiza Komitato decidis, ke la 7-a Internacia Konferenco de NEM estu dediĉita al ekplanado de la jubileo.

Sekve la ĉeftemo de la konferenco estos *La 100-jara datreveno de Esperanto* kun jenaj eblaj subtemoj: 1) *La lingva situacio en internaciaj rilatoj en la nuna jardeko* (UN, EEK, Europa Konsilio, Unuiĝo de Amerikaj Ŝtatoj, Tria Mondo), 2) *La aktuala kaj potenciala rolo de la Internacia Lingvo kaj la rolo de la Esperanto-organizaĵoj kaj instancoj uzantaj la Internacian Lingvon* (ICNEM, UEA, SAT, junularaj, fakaj kaj aliaj organizaĵoj respektive Eŭropa Klubo), 3) *Kadra programo por celebrado de la datreveno en 1987 cele al amasa plua disvastiĝo de la Internacia Lingvo.*

En la programo de la konferenco estos ankaŭ la unua ĉefkunveno de ICNEM kaj kulturaj, ekskursaj kaj distraj aranĝoj.

*4. Kotizoj.* La konferencaj kotizoj estas fiksitaj jene:

| | Ĝis 31/12 1980 | Ĝis 31/3 1981 | Post 31/3 1981 |
|---|---|---|---|
| Konferencan(in)o ... | 125 dkr. | 150 dkr. | 175 dkr. |
| Geedza paro ... | 175 dkr. | 200 dkr. | 225 dkr. |
| Junul(in)o 15-25-jara ... | 75 dkr. | 100 dkr. | 125 dkr. |
| Junul(in)o malpli ol 15-jara ... | senpage | senpage | senpage |
| Blindul(in)o kaj ties akompanant(in)o . | senpage | senpage | senpage |

5. *Loĝado.* La altlernejo havas 30 unulitajn kaj 30 dulitajn ĉambrojn kaj tiel povas normale gastigi 90 personojn, sed se necese oni povas meti ekstran liton en ĉiun unulitan ĉambron, kaj cetere ekzistas ebleco disponigi ankoraŭ 10 litojn. Do, maksimume 130 konferencanoj povos loĝi en la altlernejo. La prezo por lito kaj plena pensiono dum la tuta konferenca semajno — de vespermanĝo dimanĉon la 12-an de julio ĝis lunĉo sabaton la 18-an de julio — estas 1.550 dkr. (inkluzive de aldonvalora imposto, 22 %), por infanoj ĝis 12-jaraj 775 dkr.

Pri prezoj, antaŭpago je mendo kaj ceteraj kondiĉoj vidu la aliĝilon enmetitan en tiun ĉi numeron de *Horizonto.*

La ĉambroj havas varman kaj malvarman akvon. Necesejoj kaj duŝoj troviĝas en ĉiu koridoro.

6. *Aliĝo.* Instrukcioj pri aliĝo al la konferenco estas presitaj sur la aliĝilo. Frua aliĝo certigas loĝadon en la altlernejo, kaj ĝi estas precipe rekomendinda al tiuj, kiuj preferas unulitan ĉambron, ĉar tiaj ekzistas, kiel supre informite, nur en limigita nombro.

*Bonvenon al la 7-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado daŭriganta la tradiciojn de la zamenhofa esperantismo — humaneca internaciismo!*

## HUNGARLANDA ESPERANTO-MUZEO KAJ BIBLIOTEKO JUBILEAS

Ĝi antaŭ 20 jaroj fondiĝis en la kadro de «Biblioteko Somogyi» en Szeged.

Ĉijare, okaze de la 20-a datreveno de ĝia fondiĝo, prof. Ernesto Farkas —ĝia fondinto kaj organizanto— pretigis belan emblemon. Meze de helblua kvadrato 9 x 9 cm-a, troviĝas malhelblua 6 cm-a diametra cirklo, sur kies surfaco videblas arte formita kvinpinta stelo el literoj «Esperanto» kaj la fondiĝjaro 1960. — La reliefan emblemon povas ricevi institutoj aŭ personoj, kiuj apogas la bibliotekon per valoraj librodonacoj, revuokolektoj aŭ pli granda monsumo.

La jubileanta instituto dum monato julio kaj aŭgusto aranĝis ekspozicion sub devizoj: ESPERANTO EN LA SCIENCO kaj ESPERANTO EN LA PLASTIKO en reliefa arto. La ekspozicio okazis en la urba kultur-palaco dum la famaj someraj teatraj festivaloj en la urbo SZEGED (Hungario).

La artan emblemon de la instituto ĝis nun ricevis:

Hungara Esperanto-Asocio, La Fervojista Sekcio de Hungara Esp. Asocio, S-ro inĝ. Szilárd Szabad (Svedujo), f-ino red. Inés Gastón (Hispanio), s-ano em. presisto kaj eldonisto Aleksandro Szalay (Budapeŝto), em. presisto Vilmos Radnai (Dunaharaszti, Hungario) s-ano György Gyuris (Szeged, Hungario), s-ro Hukunaga - Isao (Hukuoka-si, Japanio), konata verkisto kaj poeto s-ro E. de Kock (Sud-Afriko), s-ro Louis Obrecian (Usono).

*Stefano Csombai*

Pere de Prof. Ernesto Farkas, mi gratulas al la esperantistoj de Szeged, pro la jubileo de Hungarlanda Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko, kiun mi vizitis en la jaro 1966-a dum la Oficiala Postkongreso, okazinta en tiu interesa kaj bela urbo. — Samtempe, mi kore dankas al ili pro la bela emblemo ricevita.

*Inés Gastón*

### 20-aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ - 1980-a

## VERDIKTO

| | |
|---|---|
| NATURA FLORO: | «Kanto de Salomon al Ŝulamit», de Jiři KORINEK, el Ĉeĥoslovakujo |
| Subpremio: | «Studenta kanto», de Zora HEIDE, Svedujo |
| JASMENO: | «'Cannabis indica'», de Joan Ramon GUIÑON, el Hispanujo |
| VIOLO: | «Ni estas nur homoj», de Zora HEIDE, el Svedujo |
| ORIGINALA PROZO: | «Du Virgulinoj ĉe rando de infero», de Bernard GOLDEN, el Hungarujo |
| Subpremio: | «La Sinjoro Instruisto», de Georgi MIHALKOV, el Hungarujo |
| TRADUKA BRANĈO | |
| Subpremio: | al Luis SERRANO PEREZ, el Hispanujo |

Subskribis la Verdiktan Akton: P. Manuel CASANOVES, CMF, Prezidanto; Salvador GUMA, R. FERNANDEZ JURADO, Joan VELEZ; kaj G. MORA i ARANA, Sekretario.

Vilanova i la Geltrú, Hispanujo, la 28-an de septembro 1980-a.

## INTERNACIA CENTRO de la Neŭtrala Esperanto-Movado

Koresponda adreso: S-ro Cand. oecon. H. V. Rasmussen, Bygtoften 8, DK-2800 Lingby Danlando

*Informa bulteno n-ro 1*

*Fondo de Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado*

Dum la 6-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado okazinta en Strasburgo de la 26-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1980 estis fondita Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado kaj akceptita ĝia Statuto.

Unu el la celoj de la Centro estas manifesti kaj interne de la Esperanto-Movado kaj ekster ĝi la tradiciajn kulturajn kaj ĝenerale ideajn valorojn de la partipolitike kaj religie neŭtrala Esperanto-Movado.

La Centro kunordigos la laboron de ĉiuj neŭtralaj Esperanto-organizaĵoj kaj agadgrupoj, se ili deziras tion. Ĝi kreos financan bazon por certigi publikigadon de Horizonto kaj de aliaj periodaĵoj, kies linio konformas al la Deklaro de Principoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado.

La Centro tute ne celas fariĝi amasa Esperanto-organizaĵo aŭ konkurenci al kiu ajn ekzistanta Esperanto-societo. Tial ĝi havos nur limigitan nombron da membroj en 4 kategorioj: fondintoj, bonfarantoj, apogantoj kaj aktivaj membroj.

La provizora Plenuma Komitato, kies sola tasko estas funkciigi la Centron en la sekvanta jaro, konsistas el: prof. d-ro Ivo Lapenna (Britio) kiel prezidanto, d-ro Klaus Perko (Aŭstrio), s-ro Jean Thierry (Francio) kaj f-ino Marianne Vermaas (Nederlando) kiel vicprezidantoj kaj s-ro Cand. oecon. H. V. Rasmussen (Danlando) kiel sekretario/kasisto.

La interesiĝantoj povas ricevi la Statuton kaj aliajn informojn de la sekretario/kasisto H. V. Rasmussen, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby (Danlando).

Jam la unuan tagon en Strasburgo multaj konferencanoj aliĝis al la Centro kiel fondintoj aŭ aktivaj membroj, dum aliaj promesis fariĝi aŭ bonfarantoj aŭ apogantoj.

## LASTMOMENTA INFORMO

Internacia Lingvo nun tutmonde oficialigita por kibernetikistoj

La IX-a Internacia Kongreso pri Kibernetiko (Namur, 1980-09-08/13) provcele akceptis — krom la francan kaj anglan — unuafoje neŭtralan, trian laborlingvon — kaj la provo laŭkvante (kaj laŭkvalite!) sukcesis: ĉ. unu kvarono de la kongresprelegoj okazis en Internacia Lingvo! Surprizo estis, ke ne nur prelegintoj el FR Germanio, Danio, Italio, Pollando, Brazilo kaj aliaj landoj de la 3-a lingvo-mondo uzis — same kiel prelegintino el Nancy (F) — ILon, sed, ke eĉ IBM Britio kaj Control Data Systems (Usono) prezentigis siajn kibernetikajn evoluigaĵojn ne angle sed ILe. La membrokunveno de Internacia Kibernetika Asocio (IKA) sen kontraŭvoĉo tial rekomendis ILon kiel samrangan trian laborlingvon — kaj por la kongreslibro, kaj por la X-a IKK (1982).

Informis, *Prof. D-ro H. Frank*

## 53-a KONGRESO DE S.A.T.

Preskaŭ 400 kongresanoj el 18 landoj kolektiĝis en Rijeka, la plej granda jugoslavia havenurbo, kie inter la 19-a kaj 25-a de julio okazis la 53-a Kongreso de S.A.T. Ĝi estis la tria kongreso de tiu organizaĵo ĝis nun okazinta en Jugoslavio.

Unu el la centraj temoj de la Kongreso, prezentita de la gastiganta lando, estis la evoluo de la jugoslavia memmastrado, pri kiu temo enkonduke parolis Ivan Marušić, membro de la Asembleo de Sindikatasocio por Kroatio. Ĝi vekis abundan diskuton, same kiel la prelego de d-ro Peter Zlatnar pri la temo «Klasa kaj nacia en jugoslavia praktiko». Pluraj diskutantoj en diversaj kunvenoj substrekis la gravecon de kunlaboro de SAT kun neesperantistaj organizaĵoj en diversaj landoj.

La delegacio estis oficiale akceptita ĉe la Prezidanto de la Komunumo.

Krom labora okazis ankaŭ la distra parto de la Kongreso: ekskursoj al fama groto Postojna kaj Plitvice-lagoj, perŝipa rondveturado kaj adiaŭo en fama somerumejo Opatija.

Okaze de la Kongreso aperis ankaŭ broŝuro pri Jugoslavio, donacita al ĉiu kongresano.

Dum la ferma kunsido estis akceptita aparta rezolucio.